



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

Senlime

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe****www.senlime.org****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).**ENHAVO :****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2010 (2/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Dum la neolitiko, nova socio aperas...****p. 6 : Verviersa angulo (reprise des cours)**

La ŝtono «Haina», blankigita, supre de Weris (nia estonta trilanda renkontejo)

Pri la Zamenhof-festo, nenio estas ĝis nun antaŭvidita, neniu sin proponis por organizi ĝin, kaj la pasintjara sperto (neĝo-plenaj vojoj kiuj eĉ malhelpis la alvenon de triono da aliĝintoj kaj sufiĉe malfruigis la aliajn) ne instigas nin denove starigi risiko-plenan feston.

Nia lingvo baldaŭ estos 125-jara. Pri ĝia naskiĝo, la dua de junio estas la sola dato certa, ĉar la sola en la Unua Libro: neniu alia estas certa, inkuzive de la 26a de julio, tradicie indikita kiel "eliro al la mondo" (probable tio okazis jam la 21an).

Ĉu ni (almenaŭ **Senlime**) ne festu je tiu dato (aŭ ĵus antaŭ) anstataŭ la (malvarma kaj foje neĝoplana) decembra Z-festo? Krome, forestus la konkuro kun la kristnaskaj, nov-jaraj kaj aliaj (Z...) festoj...



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncituraj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Trilanda renkontiĝo en Weris

La Verviersa Esperanto-Grupo preparis plian trilandan renkontiĝon en Belgio, precize en WERIS [Ueris], unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en Belgio, situanta sude de nia Euregion Mozo-Rejno.

Tiun vilaĝon oni kelkfoje (verdire sufiĉe troige) nomas "Belga Stonehenge" pro vasta tiea megalita kampo longa je 8 km.

La akceptejo estas la trinkejo de la muzeo pri megalitoj, malfermita ek de la 10a horo matene.

Post vizito de tiu tre malgranda muzeo, akceptas nin najbara restoracio «La Pierre Levée» [La ŝtono starigita = la menhiro!] per jena menuo :

- Dolmena pasteĉo, salato
- Ĉasaĝa raguo, fritbuloj, piro je vakcinioj sur celeria kaĉo
- Metiista glaciaĝo vanilo / spekuloso (belga biskvito seka kaj sukerita).

Por la posttagmezo ni preparis agrablan promenadon (5 km !) tra la megalita kampo... por fine kune trinki kafon kaj manĝi tortopecon en la trinkejo de la muzeo.

Kiam vi legos tiujn liniojn, la evento aŭ almenaŭ la limdato por aliĝo (la 25an de septembro) verŝajne jam estos preterpasita. En la kontraŭa kazo, ne hezitu informiĝi ĉe ni...

10-03 10h00 BE-Weris, trilanda renkontiĝo de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org

Aranĝistaj klavaroj

Unu el la muzikaj metioj estas «Aranĝisto». La muzika aranĝisto estas kompleta muzikisto : li kreas aranĝojn. Li ne estas komponisto sed povus esti. Oni donas al li melodion (kun aŭ sen akompano) kaj li kapablas fari ĉion alian.

Li ekzemple povas ludi muzikon laŭ alia stilo (ritmo, k.t.p.) ol la originalo. Li povas adapti melodion por ke ĝi taŭgu por donita kantisto. Li povas aŭdigi la ĝustan noton per la taŭga instrumento, je la bona momento.

Jam de kelkaj jaroj, oni povas aĉeti muzikajn klavarojn kiuj, pere de elektronikaj cirkvitoj, povas parte fari tian laboron. Per tiaj aparatoj, muziki iĝas multe pli facile.

Laŭ kelkaj, muziko estus internacia lingvo. Per tiaj aparatoj, tiu frazo trovas sian sencon. Muziko, kiel lingvo, estas tre malfacile lernebla. Estas konate ke deko da jaroj necesas por majstri tradician instrumenton.

Per klavaro aranĝista, oni multe pli facile kaj rapide atingas preskaŭ saman rezulton. Tion montros al ni J-M. Jacques per propra aparato «Roland EXR-5s», kiu (preskaŭ) ne plu kaŝos sekretojn al vi post tiu prelego.

Samtempe vi havos la okazon reaŭdi kelkajn iamajn muzikajn sukcesojn (el la «publika bieno») !

J-M. Jacques lernis kiel ludi «modernan orgenon» ĉ. 1980, dum du jaroj, sed pro troa profesia okupiĝo, iom post iom devis forlasi tiun ŝatokupon.

Post lia emeritiĝo en 2008, li sekvis kurson pri «sintezilo» en la kultur-centro de Dison, kie li nun finas la lastan studjaron kaj ekludis en speciala orkestro da «sinteziloj» konsistanta el iamaj kursanoj de tiu kultur-centro kaj aliaj muzikantoj: «The Keyboard Sound Orchestra» (KSO).

La majstro de tiu orkestro estas Richard Chardry, Verviersa artisto studinta en la tiea muzik-konservatorio. Li komence estis bonega frapisto sed iom post iom forlasis la frapilaron por klavaro, sinteziloj kaj Hammond-orgeno. Li koncertis antaŭ miloj da personoj kaj eĉ komponis kanton «La Muziko» por la fama internacia «Eŭrovida kant-konkurso».

La KSO li fondis en 2006, kun dek-kvino da klavarantoj, ĉiu el ili aŭdigante unu el la instrumentoj de orkestro : orgeno, piano, ĥoro, violono(j),... En tiu orkestro nun ankaŭ J-M. Jacques ludas (...saksofonon per sia klavaro).

Tiu ununura orkestro jam pruvis per pluraj koncertoj ke ĝi facile povas ludi ĉiujn muzikojn, ekz-e J. Last, G. Miller, J.-M. Jarre, The Shadows, A. Brasseur kaj multaj aliaj... Ĝi eĉ ankaŭ facile povas transiri de pop al klasika.

La KSO estas finiganta diskon kaj plia koncerto okazos en Dison (salonego Luc Hommel), la 6-an de novembro je la 20a horo.

Aŭskultu ĉe <http://www.the-kso.net/programme.htm>

10-18 19h30 BE-Kelmis, Select: «**Aranĝistaj klavaroj**», prelego de J-M. Jacques.
Inf. jacques@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2010 (2/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

09-17 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : Projekciado per granda ekrano de filmetoj pri esperanto/Amikejo.
Inf. jacques@senlime.org

10-03 10h00 BE-Weris,
Megalita Muzeo : **Trilanda renkontiĝo**
Inf. jacques@senlime.org

10-15 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Aranĝistaj klavaroj**", far' Jean-Marie **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

11-19 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : "**La Habsburga linio en la Preus-arbaro**", prelego de Mathieu **Schrymecker**.

12-12 Zamenhof-festo
Dato konfirmota, loko kaj temo(j) decidotaj (organizanto serĉata).



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **01-21, 02-18, 03-18, 04-15, 05-20** kaj **06-17** (karaokeo).

17-09 19h30 BE-Kelmis,
Sélect : Projection sur grand écran de petits films sur l'espéranto/Amikejo
Inf. jacques@senlime.org

03-10 10h00 BE-Weris, Musée des Mégalithes : **Rencontre des (espérantistes des) trois pays**
Inf. jacques@senlime.org

15-10 19h30 BE-Kelmis,
Sélect: "**Claviers arrangeurs**", présentés par J-M. **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

19-11 19h30 BE-Kelmis,
"**La ligne Habsbourgeoise dans la Preus-Wald**", par Mathieu **Schrymecker**.

12-12 fête Zamenhof
Date à confirmer, lieu et thème(s) à décider (on cherche organisateur).



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **21-01, 18-02, 18-03, 15-04, 20-05** et **17-06** (karaoke).

Novaĵoj pri **AMIKEJ** kaj **EMRo.** (el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

"La bela biciklo RAVeLa"

[Le beau vélo de RAVeL] estas radio-elsendo de "Vivacité", t. e. Radio (+Televido) Belga Francilingva, kiu somere organizas ĉiusemajnan biciklan promenadon, ie en Belgio, laŭlonge de la RAVeL [Reto aŭtonoma da malrapidaj Vojoj]. Tio okazis en Plombimonto [Plombières], sabaton la 28an de aŭgusto, por trilandima senpaga festo okaze de la belga prezidanteco de la Eŭropa Komunumo.

Trilanda biciklado ek de la 13a horo... Tri koncertoj programitaj ek de la 17a horo, kun Léopold Nord et Eux, Dave kaj Helmut Lotti. La aliĝo estis senpaga, kio allogis multajn homojn. La 2000 unuaj aliĝintoj ricevis senpagan maten-manĝon. La 1000 unuaj plie ricevis t-ĉemizon je la koloroj de VivaCité kaj de "Beau Vélo de RAVeL".

La bicikla vojo, post 16 km tra Vaals, Plombières kaj Moresnet-Chapelle (kie troviĝas la fama kalvario kun paĝoj en la ttt-ejo en esperanto de Senlime(.be), eniris la faman Preus-arbaron kaj atingis (tre precize post 16,9 km da biciklado) limŝtonon de la iama neŭtrala teritorio de Moresnet... sed la dokumentoj de RTBF kompreneble ne menciis ke temas pri iama esperantista regiono.

La promeno estas elsendita de VivaCité kaj la BRF (oficiala radio de la komunumo germanlingva de Belgujo). Por revidi la elsendon, sufiĉas indiki la tagon kaj la horon ĉe :

<http://www.rtb.be/tv/revoir>.

Miró en la muzeo pri la Gueule

La mondfama Katalunia pentristo kaj skulptisto, Joan Miró, ekspozicios dum ses monatoj siajn litografiojn en la muzeo pri la "Gueule" en Kelmis.

La artisto kaj liaj verkoj estas prezentitaj en kvar lingvoj : franca, germana, nederlanda kaj... angla (kion vi esperis?).

La ekspozicio daŭros ĝis la fino de la jaro 2010.

6-a Mozellanda Esperanto-Semajnfino

La ĉi-jara, 6a Mozellanda Esperanto-Semajnfino okazos de la 8a ĝis la 10a de oktobro denove sur Marienburg apud Zell/Mosel.

La iom ŝanĝitan programon vi trovos ĉi-tie:

<http://www.esperanto-rlp.de/>

Ni povis mendi 35 litojn en unu-kaj dultaj ĉambroj. Ni planas itineron tra la vitejoj al vinfarejo kaj destilejo por gustumi vinojn kaj destilaĵojn. Estos laborgrupo pri Vikipedio. Interesa prelego pri Ĉinujo kaj Togolando atendas vin!

Ankoraŭ estas 15 liberaj lokoj! Do, tuj aliĝu!

Komunikis
Wolfgang Bohr
(39a cirkulero Esperanto-RLP).

5a INTERNACIA RENKONTO

5a internacia renkonto okazis en Helmond, Nederlando, ĉirkaŭ Gemert, sabaton 18 septembro 2010.

El kie venas la bongustaj nederlandaj tomatoj? En Gemert ni povis malkovri ĉiujn sekretojn pri tomatoj.



Se post tiom da tomatoj ni estis frenezigiĝintaj, la posttagmeza programo kuracis nin: ni eksciis ĉion pri la historio de frenezultraktado.

Vespere estis komuna restoracia manĝo por tiuj kiuj tion deziris.

Ĉiuj programeroj estis senkostaj, krom la vespermanĝo, tio estis por propra kosto.

Proksimume semajnon antaŭe ni sendis al ĉiuj partoprenontoj vojpriskribon kaj aliajn detalojn.

Ĝis septembro 2011 por nia 6a renkonto !

Komunikis
Twan Gremmen
Ralph Schmeits

Dum la neolitiko (6000 – 3000 jaroj antaŭ J.-K.)

NOVA SOCIO APERAS

(informoj ĉerpitaj kaj kompletigindaj en la muzeo pri megalitoj en *Weris*)

BABY-BOOM

La neolitikan periodon stampas neniam okazinta «baby-boom». Unu el la kialoj ŝajnas esti la fikshejmiĝo: kontraŭe al la nomadoj (kiuj portas siajn infanojn), la vilaĝaj virinoj kuŝigas ilin, do mamnutrante ilin pli kaj pli mallongtempe. Tial, ili pli rapide iĝas denove fekundaj, kaj ilia fertileco estas pli granda (ĝis 8 infanoj). Tiu demografia premo devigis la homojn eltrovi novajn ekzisto-rimedojn (agrikulturo kaj bredado), kiuj intensigis la fikshejmiĝon, kaj tiu lasta eĉ pli kreskigis tiun fenomenon.

TEKSARTO

La apero de krudaj materialoj novaj (interalie la kulturita lino), kuntrenas disvolvon de metiistaj laboroj, ŝpinado kaj teksado, por kiuj specifa ilaro estas uzita (ŝpinilo kaj teksmaŝino). Ek de tiam, la homo ne plu vestos sin nur per feloj.

KUIRARTO

La neolitika kuirado profitas de la uzado de ceramikaj potoj kiuj ebligas la likvaĵan kuiradon. Supoj kaj kaĉoj tiel aldonas sin al la menuo, same kiel grenoj, kiu ebligas pan-faradon.

MUELADO

La pistado de la grenoj por transformi ilin en farunon estas ligita al la fikshejmiĝo: la muelado efektive postulas la uzon de peza ilaro, malfacile transportebla (dormanta kaj rulanta muelŝtonoj).

VAR-INTERŜANĜO

Pro la fikshejmiĝo, la homo fakiĝis en iaj taskoj (potfarado, korbo-farado, manfarado da iloj, kaj pli poste la prilaborado de la metaloj). Do por havigi ion al si, foje necesis sin direkti al la aliaj, ankaŭ por havigi al si materialajn rimedojn aŭ krudajn materialojn (kiel siliko kaj ambro) netrov-eblajn en iuj regionoj.

Tiel kreiĝis interŝanĝan reton.

Dank'al komerco, la civilizacioj multe ekfloris. La fakto vojaĝi de vilaĝo al vilaĝo, sed ankaŭ de regiono al regiono, intermiksas la kulturojn kaj ebligis multe pli rapidan disvolvon de la teknikoj kaj de la progreso.

MILITISTOJ

Praktikante agrikulturon kaj bredadon, la homo stokas nutraĵojn, foje eĉ abunde. Tiuj provizaĵoj altiras avidecon, pro kio necesas sin protekti kontraŭ potencialaj malamikoj (sovaĝaj bestoj, malamikaj gentoj). Tiel naskiĝas konfliktoj kaj militoj, kaj pro tio, nova socia tavolo: la militistaro...

HIERARKIIGO, FAKIĜO

La komunuma vivo kaj la apero de novaj agadoj (interalie metiistaj) postulantaj specifan lertecon formadis novan socion stampitan de fakiĝo kaj hierarkiigo. La elmergiĝo de la «ĉefoj», eĉ de privilegiitaj socitavoloj, precipe montriĝas en la funebraj ritoj (selektaj entombigoj en la dolmenoj).

CERAMIKO

La potfarado estas ĉefa invento por la vivmaniero neolitika. Efektive, ĝi konsiderinde plifaciligas la stokadon de la nutraĵoj (grajnoj, faruno, likvaĵoj), ilian preparadon (kuiradon) kaj ilian konsumadon. Ĝia rolo ankaŭ estas kultura: la diverseco de la fabrikaj teknikoj, de la formoj kaj dekoroj ebligas distingi inter la kulturoj, kiuj ofte estas nomitaj laŭ ilia potfarado (ekz-e en Eŭropo: la rubanda aŭ la kardiuma/konka).

KORBOFARADO KAJ ESPARTARTO

Sendube la plej malnovaj aspektoj de metiista laboro, korbofarado kaj espartarto ebligas fari ornamajn aŭ utilecajn objektojn (korboj, plektaĵoj, ĉapeloj, k.t.p.) helpe de vegetalaj fibroj (rotango, vimeno, plektita pajlo, rafio, kanoj, lignaj bastonetoj...).

POLURADO

La polurado de ŝtonaj iloj disvolviĝis dum la neolitiko kun la kulturebligado kaj la ligna prilaborado (oni eĉ parolas pri la «erao de la polurita ŝtono»). La poluradon oni atingas per frotado de la peco sur grejsaj aŭ kalkaj poluriloj. Tiu longa laboro igis tiujn pecojn pli multvaloraj.

La poluritaj iloj ebligas pli bonan rendimento en la prilaborado de la materialoj (kiel ligno aŭ tero, ekzemple).

La ĉasiloj ankaŭ estos poluritaj, kio kreskigos ilian penetradan povon.

Verviersa Angulo

Verviersa Esperanto Grupo

Reprise des cours

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
dès aujourd'hui l'une des cotisations
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo
25 Rue Pierre Fluche
BE4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est de
nouveau obligatoire et fixée à 10
EUR (l'abonnement à ce bulletin en
version «papier» s'élève à 12 € en
raison de l'augmentation des coûts).*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2009 (EGV) 14 €

U.E.A. 2010 (MA) 60 €

Senlime (cotisation 2010) **10 €**

en indiquant le nom du membre
cotisant, le bénéficiaire, l'année
«cotisation de pour».

L'espéranto est sans aucun doute la
plus facile de toutes les langues
mais, comme toute langue, il y a
lieu de l'étudier soigneusement,
surtout au début (beaucoup de
déceptions sont dues au fait que
certains croient pouvoir comprendre
l'espéranto après quelques minutes
d'explication - or, une chose est de
savoir ce qu'est l'espéranto, une
autre chose sera de le maîtriser).

Les cours d'espéranto «à la
demande» - pour débutants -
reprendront fin septembre (en
principe le samedi 25 de 9h30 à
11h30) et pour 5 semaines (10 h.
de cours intensif), en principe
consécutives. Les participants
achèveront leur première étude à
domicile en lisant un roman policier
en espéranto et en participant, le
cas échéant, à nos réunions à La
Calamine (covoiturage possible). Il
reste actuellement 2 ou 3 places
pour ce cours (renseignements et
inscription avant le 25 septembre !).

Rappelons nous organisons des
cours à la demande d'une personne
ou association qui propose au
moins 3 autres participants... et un
local à Verviers (maximum 7
élèves/cours).

Différents stages et séminaires,
d'une ou plusieurs semaines,
donnent la possibilité de se
perfectionner en espéranto et/ou de
s'initier dans les domaines les plus
divers, en espéranto (surtout
pendant les congés et vacances
scolaires)... Le programme de ces
activités est régulièrement publié
dans les journaux et revues
espérantistes.

**Les gens qui ne sont pas forts
en langues étrangères disent
des choses bien étranges...
Prenez donc des cours
d'espéranto !**

Trois méthodes convergentes
seront utilisées dans ce cours :

1. Un cours préparatoire à la lecture
du roman «Gerda malaperis»
permettra d'acquérir la grammaire
et les 250 mots de base de toute
langue (prépositions, articles,
pronoms,... + environ 180
«racines» et affixes indispensables
à toute communication.

2. Une dizaine de séances de type
«drill» amèneront dès le début
l'élève à parler (certes simplement
mais correctement) en espéranto.

3. Une série de «karaokés
pédagogiques» (version moder-
nisée des «plans langues» radio-
phoniques) renforcera agréa-
blement les deux éléments
précédents tout en plongeant déjà
l'élève dans l'ambiance et la culture
espérantistes : une chanson est
écoutée, le texte traduit et
éventuellement expliqué... et la
chanson est réécoutée jusqu'à ce
que – le cas échéant – vienne
l'envie de la chanter (avec sérieux
ou humour : nous ne formons de
toute façon pas une nouvelle
chorale et personne ne doit se
sentir «forcé»).

La lecture du roman «Gerda
malaperis» permettra d'accroître
encore ce vocabulaire jusqu'à plus
de 600 racines... Celles-ci,
juxtaposées (précisément comme
en chinois), permettent de former
ainsi près de 5000 mots composés,
soit bien plus que nécessaire.

L'espéranto connaît un sérieux
regain d'intérêt de nos jours, grâce
à l'internet et aux exigences
linguistiques de nouveaux pays
«émergeants» (moins favorables à
l'anglais). En Chine, par exemple,
ce sont des dizaines de milliers
d'étudiants qui viennent accroître
chaque année le nombre
d'espérantistes.